

Henriette Luise von Hayn,  
Ĉar ŝafeto estas mi

*tradukita de Manfred Retzlaff*

1. Ĉar ŝafeto estas mi  
De Jesu', nur ĉiam pli  
ĝojas mi, ĉar Li sufiĉe  
Min gastigas, jes tre riĉe;  
Mian nomon konas Li,  
Amas min ja tiu ĉi.

2. Kaj sub Lia paŝt-baston'  
Ĉie estas por mi bon';  
Kaj mi sentas grandan ĝojon,  
Ĉar min gvidas ĉiun fojon,  
Kiam eksoifas mi,  
Al la freŝa fonto Li.

3. Ĉu ne estu gaja mi?  
Ĉar post tiu vivo ĉi  
Kiel bona ŝafpaŝtiso  
Portos min Jesuo Kristo  
Hejmen al la kara Di'.  
Amen, ja feliĉas mi!

*Traduko de la Germana poemo "Weil ich Jesu Schäflein bin" de Henriette Luise von Hayn en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 1985-04-28.*

MR-183.2a / Arg-685-1380 (2012-11-27 22:18:48)

Vidu ankaŭ: [http://www.lutheran-hymnal.com/german/agerman\\_tlh.html](http://www.lutheran-hymnal.com/german/agerman_tlh.html) kaj <http://www.musicanet.org/robokopp/Lieder/weilichj.html>.

Henriette Luise von Hayn,  
I am Jesus' little lamb

*tradukita de Richard Jordan*

Argiope-informo:  
La aspekto de tiu ĉi versio estas barita.  
Supozeble la aŭtoro decidis tion.

*Traduko de la Germana poemo "Weil ich Jesu Schäflein bin" de Henriette Luise von Hayn en la Anglan de Richard Jordan.*

Arg-685-1381 (2012-11-27 22:58:19)